

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

April 1944

32 årg. Nr 4

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## *Al Karlskoga Pentekoste!*

Tipa bildo pri arbaroj kaj lagoj en Karlskoga.

*Ni esperantistoj en Karlskoga invitas vin ĉiujn iri al nia urbo pentekoste, la 27-an—29-an de majo.*

*Ni nun havas la ĝojon prezenti la programon por la kongreso kaj ni certe povas promesi, ke Vi ricevos vere gajan, multedonan kaj memorindan kongreson.*

*Esperante, ke tiu ĉi kongreso fariĝos bona plivigligilo por nia movado, ni direktas niajn plej elkorajn bonvensalutojn al ĉiu ano de la verda Svedujo. Tuj anoncu Vian aliĝon kaj certigu Vin pri gaja kaj memorinda pentekosto sub la signo de Esperanto.*

**Loka Kongresa Komitato.**



Tipa bildo de novkonstruita Karlskoga.

# SEF:s KONGRESS I KARLSKOGA 1944.

Under pingsten den 27–29 maj hålles SEF:s kongress i Karlskoga. Kongressens högtidliga öppnande kommer att ske i Stadsfullmäktiges plenisal i Stadshuset, där även alla övriga sammanträden hållas. Kongressdeltagarna hälsas välkomna till Karlskoga av stadens Kommunalborgmästare Eric Ericson.

## PROGRAM:

### Lördagen den 27/5. Kongressens högtidliga öppnande. Festsupé.

- Kl. 15.00 Kongressbyrån öppnas i Stadshotellet.
- Kl. 17.30 Svenska Lärares Esperanto-Förbunds årsmöte.
- Kl. 18.30 SEF:s styrelse sammanträder.
- Kl. 19.00 Kongressens högtidliga öppnande i Stadsfullmäktiges plenisal i Stadshuset.
  1. Hälsningstal av Borgmästare Eric Ericson.
  2. Tal av Förbundsordföranden.
  3. Unison sång.
  4. Välkomsthälsning.
  5. Punkterna 1–5 i SEF:s årsmötes dagordning.
- Kl. 20.30 Interkonatiga vespero i Stadshotellets festvåning.
  1. Festsupé.  
Gäster och ombud ha tillfälle att överbringa hälsningar. Utdelning av förbundets diplom för troget medlemskap.
  2. Angenäm samvaro med dans till kl. 02.00.

### Söndagen d. 28/5. Kongressförhandlingar - Samkväm.

- Kl. 9.00 Förlagsföreningen Esperanto:s årsmöte.
- Kl. 10.00 SEF:s årsmöte fortsätter. Punkterna 7–19 i SEF:s årsmötes dagordning.
- Kl. 12.30 Lunchpaus. **Karlskoga stad inbjuder kongressdeltagarna som sina gäster till lunch.**
- Kl. 14.30 SEF:s årsmöte fortsätter och avslutas.
- Kl. 18.30 Paus c:a 1 timme.
- Kl. 19.30 Samkväm med supé å Konsumrestaurangen. Färgfilm över Karlskoga. Sång av en Esperanto-kvartett, solosång, allsång, dans m. m.

### Måndagen den 29/5. Gudstjänst — Rundvandring i staden.

- Kl. 9.00 Gudstjänst på esperanto i Karlskoga kyrka.
- Kl. 10.00 Rundvandring i Karlskoga. Därefter samling vid Bofors Ungdomsgård. Kaffebord. Avslutning.

### Dagordning för Förbundsmötet 1944.

1. Hälsningsord av representant för lokalföreningen.
2. Tal av förbundsordföranden.
3. Fastställande av dagordning.
4. Val av mötesfunktionärer: a) ordförande b) vice ordförande c) sekreterare d) vice sekreterare e) pressombud f) valkommitté g) justeringsmän.
5. Val av ombud till Förlagsföreningens årsstämma.
6. Hälsningar av föreningarnas representanter.
7. Justering av röstlängden.
8. Styrelsens berättelse. Behandlas punkt för punkt.
9. Revisorernas berättelse.
10. Fråga om ansvarsfrihet för styrelsen.
11. Fråga om arvode åt funktionärer.
12. Val av styrelsemedlemmar: vice ordförande, sekreterare och en suppleant.
13. Val av två revisorer och två suppleanter för dessa.
14. Arsavgiftens storlek för år 1945.
15. Motioner.
16. Rapport om IEL.
17. Rapport om Svenska Esperanto-Institutet.
18. Val av suppleant i Svenska Esperanto-Institutet.
19. Övriga frågor.

## Svedaj esperantistoj kolektiĝos en Karlskoga dum la pentekosto.

La esperantista popolo jam havas siajn tradiciojn. Unu el ili estas kunveni ĉiujare por festi sian jarkongreson. Jam oni kongresis 38-foje. Ĉiujare, la 39-an fojon, la verda popolo kolektiĝos en la vermlanda urbo Karlskoga.

Karlskoga estas tre nova urbo. La alvojaĝanto, kiu venas fervoje aŭ aŭtubuse, ne ricevas imagon pri granda, moderna urbo. Ambaŭflanke de li estas nur grandaj, densaj arbaroj, kelkfoje rompitaĵoj de malgranda ebenaĵo kun eta ruĝa domo. Kvankam li estas meze de la urbo, li trovas nek larĝajn stratojn, nek belajn domojn. Povas okazi, ke li anstataŭe ekvidos altstaturan alkon, rapidantan trans la vojjon... Tiu impona besto memorigas lin pri la tempo antaŭ kelkcentoj da jaroj, kiam ĉitie ek-kreskis eta vilaĝo. La vilaĝo iom post iom fariĝis urbo — kaj hodiaŭ ĝi staras inda por bonvensaluti la svedajn esperantistojn.

### Historio.

La historio de la urbo estas sufiĉe interesa. Jam en la jaro 1582 la dukino Karl (kiu donis la vilaĝon ĝian nomon) eldonis rajtigilon por terkulturo kaj minekspluatado. Tiu eta vilaĝo tiam kalkulis 200 homojn kaj en la jaro 1750 la loĝantaro jam estis 4000. Sufiĉe rapide kreskis la vilaĝo, kaj 1880 oni jam kalkulis 11.600 homojn. La nuntempa urbo estas loĝata de 29.000 homoj.

En la jaro 1586 la komunumo ricevis preĝejon. Tiu estis rekonstruita en 1603 kaj 1705 ĝi ricevis sian nunan

aspekton. Preĝeja vilaĝo fariĝis aparta municipo 1886. Finfine la 1-an de januaro 1940 la komunumo fariĝis urbo. Ĝi estas la plej granda urbo en la lando laŭ la areo. Ampleksas ĉirkaŭ 42.000 hektaroj, de kiuj ĉirkaŭ 1.180 hektaroj estas lagoj.

Altaj montarregionoj, belegaj valoj kaj ebenaĵoj donas al la urbo speciale vermlandan, belan naturon. Karakterizaj tiurilate estas la Popola parko kaj Nova Tombejo.

### Geografio.

La montarregiono de Karlskoga ampleksas la komunumojn Karlskoga, Degerfors kaj Bjurtjärn kaj havas areon de 7,5 kv.mejlojn. La mezalteco de la regiono estas 120 metrojn s. m. (La alteco de Kils- kaj Lekmontoj estas 200 m.) Ĝia plej alta punkto 307 m s. m. situas en la norda parto. La alteco s. m. de la lagoj estas 89–148 m. De tiuj Möckeln estas la plej granda (18 kv.km) kaj situas plej malalte. Oni ne devas forgesi menciigi pri la grandaj, densaj arbaroj, kiuj situas ĉie, en kaj ĉirkaŭ la urbo.

### Lernejoj.

Sian unuan lernejon popolan la urbo ricevis en la jaro 1825 kaj la mezgrandan lernejon en 1906. Tiu ĉi lasta aliformiĝis kiel mezlernejo en 1910. La praktika lernejo de Karlskoga fondiĝis en la jaro 1882, kiun ĉiujare vi-



zitas 300—400 gelernantoj el la tuta lando. Baldaŭ la urbo ankaŭ ricevos gimnazion.

### Minekspluatado kaj industrio.

Dum la jaroj 1640—1690 estis konstruitaj 17 altforn-ejoj. En la jaro 1639 Håkan Drost ricevis privilegion starigi grandmartelan forĝejon apud "Bärkeborn". Alia nomo koncerne tiutempan industrion estas Paul Hossman el Arboga, kiu 1646 ricevis privilegion pri du forĝejoj ĉe Boälven (nuntempa Timsälven). Tiuj ĉi forĝejoj poste ricevis la nomon Bofors. La du menciitaj forĝejoj estigis la fondo por la nuntempaj grandaj industrioj AB Bofors kaj AB Bofors, Nobelkrut, Björnbörn. La nuntempa evoluo en Karlskoga estas vasta kaj larĝa. La moderna kulturo sin montras en novaj konstruaĵoj kun vivaktualaj celoj. Menciindaj estas: la nova banejo, junulara domo, metiindustria laborejo k.t.p. La junulara domo certe estas la plej granda kaj moderna en la lando. Oni tie aranĝas kursojn, tagajn kaj vesperajn, en tre diversaj fakoj. Interalie: ligna slojdo, teksado, desegnado, pentrado, librobindado, kartona slojdo, konstruado de modelaeroplanoj, amatorteatro, popoldanco k.t.p. Krom tio la urba metilernejo aranĝas kursojn pri kudrado kaj kuirarto. Knabklubojn oni organizas kun ping-pongo, mekano k.t.p. en la programo. Similajn klubojn oni ankaŭ aranĝas por knabinoj. Diversaj studrondoj laboras tie dum la vesperoj por plialtigi la kulturan staton inter la junularo.

La partoprenantoj de la kongreso havos mem okazon vidi la menciitan domon.

Finfine ni povas diri, ke nia urbo estas interesa kaj bela urbo, kiu certe valoras viziton de la sveda esperantistaro. La grandaj verdaj arbaroj ĉirkaŭ kaj en la nova vastarea urbo vin invitas al la pentekosta kongreso en la centro de Sveda grandindustrio.

Venu al SEF:a kongreso en Karlskoga ĉi jare, vi certe ne pentos. Redakcia Komitato.

### Med dagens nummer

följer en bilaga med titeln

## Esperanto-Kongressen i Karlskoga 1944.

Där återfinner den intresserade alla uppgifter, som äro av värde för blivande kongressdeltagare. Vi behöva här endast erinra om att kongressavgiften är 2:50 kr. och att kommittén vill ha anmälningarna senast den 18 maj samt att kongressavgiften avgår samtidigt som anmälan till postgiro 28 02 18, Karlskoga Esperanto Societo "La Aglo", Karlskoga. För anmälan användes lämpligen den blankett, som avslutar bilagan. •

## Förlagsföreningen Esperantos u. p. a.

andelsägare kallas härmed till ordinarie årsmöte pingstdagen den 28 maj 1944 kl. 9 f.m. å Stadsfullmäktiges sal, Stadshuset, Karlskoga.

Ärenden enligt stadgarnas § 11.

Styrelsen.

## Historio de mondlingvo

de E. D r e s e n.

Pris kr. 7:25 inkl. oms. o. porto.

En outtömlig källa till vetande beträffande världsspråkstankens framträngande från tidernas början till vår tid. Det gäller inte bara esperanto utan alla världsspråksprojekt av någon betydelse, som framkommit, från de första trevande försöken med besynnerliga kombinationer till våra dagars mera vetenskapligt utarbetade språk. Intressant och berikande.

Verket har varit utgånet någon tid, men nu ha vi lyckats komma över ett tiotal ex.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,  
Fack 698, Stockholm 1. Postgiro 578.

## La vivo kaj la "perfekta solvo".

F. Szilágyi.

La internacia helplingvo devas esti facila, internacia kaj tiel logika, kiel eble. Sed neniu el tiuj tri principoj rajtas trograviĝi je la risko de la aliaj. Kiam do prof. Otto Jespersen konstatas, ke Esperanto signifas grandan progreson en la historio de la internacia lingvo, sed ĝi ne estas la perfekta solvo de la problemo, oni nepre demandas: Kiel aspektas la perfekta lingvo? Kaj tiam oni revenas al la t. n. apriori lingvoj, perfekte logikaj lingvoj, kiuj havas nenian koncernon al la nun vivantaj; kiuj kombiniĝas el sonoj kaj literoj tute fremde, tute memvole kaj kies lernado estas nebla dum longa homa vivo. La akcentado de la perfekteco kaj la rigida logiko reportus nin al pli frua grado de la evoluo, kiam oni volis krei lingvojn, kiuj taŭgas absolute logike, regule, tiel regule kiel matematiko kaj kiuj sekve taŭgas — por nenio. Ili ne povus servi por homa uzado. Ni do ne forgesu, ke nur la harmonio de la supre menciitaj tri principoj povas doni vivkapablajn lingvoprojektojn kaj se ni prijuĝas Esperanton kaj ĝiajn konkursintojn kaj konkursantojn el tiu ĉi vidpunkto, ni povas konstati, ke neniu el ili povas sukcese konkurenci kun Esperanto koncerne tiun harmonion. Tion oni povus klarigi en aparta traktato, kiu komparus la diversajn lingvojn.

Oni ja povas diri: Jen tio, aŭ tio ne plaĉas al mi en Esperanto. Sed ĝenerale oni povas havi nur du sanajn vidpunktojn koncerne tiujn aferojn: 1) Ke la eventualaj riproĉoj ne aludas pri gravaĵoj. 2) Ke plej ofte temas pri la diverseco de gustoj. (Grabovski estis unu el la plej fortaj reformemuloj komence de sia agado, sed poste ankaŭ li turnis sin kaj decidis teni sin al la Fundamenta Esperanto, ĉar li ekkomprenis, ke la ofero en mala okazo estus multe pli granda ol la gajno.)

Malgraŭ tio ni provu pritrakti kelkajn tiajn ofte diskutitajn detalojn de la lingvo por kompreni, ĉu ili estas gravaj, aŭ ne, ĉu ekzistas tiaj detaloj, kiuj meritas ŝanĝon, aŭ ĉu ŝanĝo entute estas ebla.

La unua temo estas la aspekto de la lingvo. Ĉu Esperanto estas bela lingvo? Laŭ mia opinio ĝi estas bela. Sed la beleco de iu lingvo estas relativa afero. Al ĉiu plej plaĉas lia lingvo, ĉar tion oni komprenas plej profunde kaj la propra lingvo iĝas do mezurilo por aliaj lingvoj. El tio sekvas, ke lingvo, kies strukturo kaj sonfiko multe diferencas de la propra lingvo, verŝajne malpli plaĉas, ol lingvo, kiu en tiu rilato estas pli proksima al la propra. (Tio kaŭzas, ke diversnacioj — kvankam ne ĝene, sed tamen — parolas eĉ Esperanton kun nuanco de sia propra lingva prononco.)

Mi kredas, ke romanlingvano, aŭ ne-germanlingvano, same slavlingvano — pri la lasta mi ne estas tute konvinkita — ĝenerale fiksas jenan ordon de lingvoj laŭ sonfremdeco, t. e. la vicon de lingvoj, kiuj malplej plaĉas al ili: la dana, angla, holanda ktp., sed estas tute certe, ke germanlingvanoj fiksas alian vicon. Pinto de la lingva beleco por romanlingvanoj estas la itala, hispana kaj franca lingvoj, sed ne estas certe, ke ekz. meza svedo fiksus tian ordon, sed supozeble nomus la plej diferencan, kiel plej malbelan lingvon.

Oni ofte aŭdas rimarkon kontraŭ la pluralfinaĵo de Esperanto. La elirpunkto de Zamenhof en tiu rilato estis nepre tio, ke li volis krei klaran sonon por la diferencigo de la singularo kaj pluralo. Mi mem diskutis pri la sama temo kun profesia lingvosciencisto, neesperantisto; li havas bonvolan sintenon al Esperanto. Li rigardas la problemon el praktika vidpunkto kaj scias, ke Esperanto jam plenumis rolon gravan, dume teoriuloj ekiras el la fikcio, ke internacia helplingvo ankoraŭ ne ekzistas, ke ĝi estas kreota, aŭ kreata. Laŭ li la pluralfinaĵo en la elparolo ne estas malbela, eĉ bela, ĉar ĝi donas molecon al la lingvo. (La plej bela loko de la lliado en la greka lingvo, laŭ sia fonetiko sonas jene: Ojé per fillon geneé, tojjé de kaj androon. Kaj la greka lingvo estas ne pridiskutite bela!) Sed li riproĉas la skriban aspekton de la pluralo, kiu estas fremda kaj ne plaĉa. Eble li kaj aliaj pravos. Sed temas nur pri kutimo kaj relative bagatela afero. Se Zamenhof estus elektinta la skriban formon de la pluralfinaĵo jene: io, ai, supozeble ankaŭ mi preferus tion, sed ĉu grave? Ĉu tio povas decidi pri la sorto de lingvo? Kaj mi ne scias, ĉu estus



**Raukiĝinta voĉo.**

(El "Kanteletar")

Kio premis voĉon grandan,  
Voĉon grandan kaj belsonan,  
Voĉon belan difektigis,  
Kiu ĉiam flue kuris,  
Riverete plaŭdetadis,  
Kaj lagete ondetadis? —

La malĝojo premis voĉon,  
Voĉon grandan kaj belsonan,  
Voĉon karan malaltigis;  
Ke ne plu fluete kuras,  
Ne plaŭdadas riverete,  
Ne lagete ondetadas.

El la finna lingvo trad. I. E.

inde provoki nun diskuton pri tiu skribmaniero, kio kaŭzus en si novan semon de logikaj kontraŭargumentoj ĉe tiuj, kiuj volas kontraŭargumenti.

Jespersen diras, ke tia vorto, kiel **ekzameno** estas teorie **malĝusta** (el fonetika vidpunkto) kaj svedo volonte konsentas pri tio, ĉar la "z" sono entute estas malfacila por svedoj. Sed mi povas aserti, ke neniam mi havis tian skrupulon, ĉar la elparolo de tia vorto neniam kaŭzis rimarkeblan malfacilaĵon al mi kaj same ne al miaj diverslandaj amikoj. Kontraŭ la konservado de la litero "x" en la tempo de la Ido-skismo, unu el la Esp-delegaci-anoj, se mi ne eraras, prof. Boudouin de Courtenay diris akran kritikon el — lingvista vidpunkto. Laŭ mia opinio — se oni ne legas egale iun literon — estas ja tute indiferente, kiel oni signas ĝin.

Kvankam tio ne apartenas al la temo nun, t. e. la eksteraj trajtoj de la lingvo, mi volas rimarkigi, ke prof. Jespersen kritikas la mankon de sistemo koncerne la vortkunmetojn. En tiu rilato oni simple indiku la teoriajn konstatojn kaj sistemigon en la Plena Gramatiko. (Mi povas aldoni, ke tio, kiel legaĵo estas eble tro abstrakta, sed temas pri tute abstrakta gramatika detalo. Aliflanke la pritrakto estas kompleta kaj donas senmankan bildon pri la vortfarado en Esperanto.)

La sekva rimarko estas kontraŭ la supersignitaj literoj. La elirpunkto de Zamenhof estis certe optimismo. Li kredis, ke la nova lingvo tre rapide varbos milionojn kaj tiam la novaj literoj ne povos kaŭzi teknikajn malfacilaĵojn. Fakte la supersignoj estis jam malhelpo por la disvastigo de Esperanto en tiaj lokoj, kie tiu disvastigo dependis nur de presteknikaj faktoroj. Ankaŭ nun povas tio okazi, sed malofte; mi kredas, ke tiu ĉi malhelpo estas jam nun venkita pro la relativa disvastigo de la lingvo. Cetere Zamenhof proponis la uzon de "h" anstataŭ la supersigno tie, kie presteknikaj kaŭzoj ne permesas la supersignitajn literojn. (La solvo do aspektas jene: chambro, ghardeno, jhaluzo — kaj kontraŭ tia aspekto streĉiĝus furiozaj kritikoj, speciale, se oni pensas pri tiaj vortoj, kiel hholero.) Ĉi tie oni menciis la maloftan literon "ĥ", kiun oni volonte ekstermas el la pli moderna Esperanto, kie kelkaj ekuzis la vorton "kaoso" anst. ĥaoso, ĉina anst. ĥina ktp. Sed mi hezitus proponi, ke oni tute forigu tiun ĉi literon. Ne al ĉiuj nacianoj ĝi estas tiel malfacile elparolebla, kiel al svedoj kaj aliflanke ekz. al francoj la simpla "h"-sono mem estas malfacila, ĉar en la franca lingvo ĝi tute mankas. Tial kelkfoje — malofte — franco forgesas pri si kaj diras: "Mi sidis ĉe la aveno, kaj mi avis bonan umoron". Sed alrigardu vian francan kaj li tuj ripetos la frazon kun ĉiuj defraŭditaj ho-oj.

Por fini tiun ĉi parton ni menciis la "aŭ"-finaĵon, kiu estis kelkfoje kritikata kaj mi persone ne vidas ian skandalon en la tendenco, kiu volas enkonduki — unue en la literaturon — paralelajn -e-formojn al la vortoj: hodiaŭ, hieraŭ, morgaŭ, apenaŭ, ankaŭ ktp., kiuj do aspektas jene: hiero, hodie, apene, anke ktp. Estas alia demando, ĉu la vivo akceptos tiajn formojn. Kontraŭfundamentaj ili ne estas. La finaĵo -aŭ formas certan grupon kaj la principo de la grupigo ne estas tute klara en la zamenhofa projekto. Samtempe multaj diras, ke tiu "aŭ"-finaĵo, aŭ kvazaŭfinaĵo estas bela. En tiu parto subskribinto ne havas ian opinionon, eble li mem ankaŭ ekuzos foje-foje en poemo tian -e-finaĵon, se

**El Suomi-Finnlando.****Esperanto-Muzeo en Finnlando.**

Antaŭ kelkaj jaroj dro L. I. Lappi varme proponis la starigon de la Esperanto-Muzeo en nia lando laŭ modelo de la internacia en Vieno, sed kompreneble nur en modesta formo. Li mem verkis historieton de la Esperantomovado en Finnlando komencante de prof. J. G. Ramstedt, kiu jam je la jaro 1891 estis konatiginta kun la lingvo. De la malfavoraj cirkonstancoj dependis, ke lia bela propono ĝis plue ne perfekte efektiviĝis. Tamen kolektiĝis iom da materialo, kiu estas konservata ĉe la Esperanto-Instituto de Finnlando, Helsinki. Nun la eblecoj estas pli bonaj, ĉar la konata muzeoposedanto, eksparolisto de nialanda abstineca movado, sro Jalmari Matisto, kiu dum multaj jaroj kolektadis materialon por sia muzeo, kaj kiu nun posedas la plej grandan privatan muzeon en nia lando, promesis starti ankaŭ Esperantofakon en sia muzeo. La gesamideanoj estas insiste petataj sendi nun materialon por liaj kolektoj: historietojn de loka movado, librojn, bildojn, fotografajojn pri la esperantistoj, grupajn gazetojn, regularojn kaj aliajn esperantajojn.

**Finna banejo.**

La finna banejo vekis en la lasta tempo rimarkindan atenton de eksterlandaj kaj aliaj kuracistoj kaj sciencistoj. Ĝis nun ĝi estis nur malmulte konata en Svedujo, Germanujo, Francujo, Ameriko ktp. La konataj sukcesoj de la finna militistaro dum la vintra milito igis la eksterlandajn higienistojn supozi, ke la finna banejo devas ludi ian rolon je la persistemo kaj saneco de finnoj. Precipe en Germanujo oni volis esplori tiun ĉi aferon. Almenaŭ dufoje la germanaj ministroj sendis delegitojn por konatiĝi kun la finna "sauna" (banejo). Ni je nia parto volis ĉiamaniere helpi la scivolemulojn transsendante prelegantojn al diversaj landoj, desegnaĵojn ktp. En Germanlando estas starigita sauna-societo, "Deutsche Sauna-Gesellschaft" kaj eldonita gvidlibro en Stuttgart. En nia najbara lando, Svedujo, aperis libreto "Finnbastu".

Por fiziologie esplori la influojn de la sauna aperis 1933 universitata disertacio de dro Risto Lundgren kaj 1934 verko de prof. K. F. Hirvisalo. Aŭtune 1937 oni fondis specialan saunasocieton, "Suomalaisen Saunan Ystävät" (Amikoj de la finna banejo). Je la jaro 1941 aperis la unua pli detala verko de magistro H. J. Viherjuuri, nomata "Saunakirja" (Banejolibro), ampleksante 323 paĝojn kaj nunjare de la sama verkisto nova, iom pli konciza libro, "Saunaopas" (Gvidlibro pri la banejo), entenante 220 parte bone ilustritajn paĝojn. Estus tre bone, se la sama societo, "Amikoj de la finna banejo", estus ema eldoni tiun ĉi lastan, indan kaj interesan libron ankaŭ en Esperanto. Tiel la afero fariĝus ankaŭ internacie pli konata. (La subskr. intencas proponi la aferon al la societo.) La societo eldonis ankaŭ saunafilmon.

La finna banejo estis uzata, laŭ esploroj, jam de ĉ. pli ol 1.000 jaroj. Ĝi vekis nun la atenton tial, ke ĝi kunigas la bonajn econ de la roma varmega kaj seka banejo kaj tiun de la rusa banejo de varma akvovaporo. Oni uzas la banejon en Finnlando kutime ĉiusabate, sed ekzistas regionoj, kie oni sin banas dufoje aŭ pli ofte en la semajno. La banejo estas ideala purigilo, hardilo kaj refreŝigilo en multaj rilatoj. En nia lando ekzistas nune pr. 500.000 banejoj tiel, ke preskaŭ ĉiu kampara hejmo havas sian propran banejon. En la urboj troviĝas grandaj publikaj banejoj.

Oni ankoraŭ ne akurate esploris de kio dependas la mirinda, saniga kaj refreŝiga influo de banejo. Nun la baneja societo planas la konstruadon de speciala instituto por scienca esplorado de tiuj ecoj, kiu domo eklaboros post la nuna mondmilito.

H. S-1.

estos necese, sed cetere oni akceptu la juĝon de la vivo!

Resume: Oni devas konsideri ion firman en la lingva uzo kaj tial ni devas teni nin al la Fundamento, sed en tiu kadro oni povas ĉizi kaj delikatigi, eĉ beligi la lingvon.

Pri alispecaj detaloj venontan fojon.

F. Szilágyi.



## Semestern i Esperantos tecken.

23 juni—2 juli på Björkås i Dalsland.

I samband med midsommarhelgen anordnas en esperanto-vecka på Björkås pensionat. Programmet upptar föredrag om esperantos litteratur och historia samt esperanto-rörelsens ställning efter kriget. Tillfälle till diskussion. Denna midsommarvecka tillsammans med esperantister från olika delar av landet kommer säkert att bli av allra angenämaste slag och stimulera till nya tag för esperanto. Det är nämligen viktigt att vi träffas under trevliga former för att öva oss i språket, så att vi äro tillräckligt tränade, då vi efter kriget möta våra utländska meningsfränder.

Red. T. Morariu blir, liksom i fjol, ledare för kursprogrammet. Kost och logi på pensionatet blir 6 kr. pr dag.

Anmälan om deltagande måste göras senast under maj månad, då pensionatet därefter kommer att disponera överblivna platser åt icke-esperantister. Men esperantisterna kunna väl fylla hela pensionatet! Insänd Er anmälan till sro Greger Andersson, Brl. 170, Åmotfors.

Fira midsommarhelgen på Björkås!

16—23 juli på Granebo sommarhem utanför Norrköping.

I mitten av juli, i den härligaste sommarvärme, samlas vi till nästa semestervecka. Norrköpingsesperantisterna bjuda oss välkomna till sitt sommarhem. Inackorderingspriset är där endast omkr. 4 kr., men inlogeringen är något primitivare än på ett vanligt pensionat. De som så önska kunna emellertid bo i Norrköping och komma till Granebo genom en kort bussresa.

I Granebo är det meningen att red. Sven Backlund skall fungera som huvudtalare och riktstolpe. Han kommer att, med utgångspunkt från den kurs om Östersjöstaternas fredsproblem, som hölls i Stockholm i januari, behandla de fredsproblem, som hänga samman med folkminoriteterna och betydelsen av ömsesidig hjälp småfolken emellan. Särskilt de nordiska problemen skola diskuteras.

Granebo sommarhem ligger mycket idylliskt, och semesterveckan där bör bli både intressant och vilsam. Anmälan om deltagande skall ske senast i början av juni till s-ro Nils Johansson, Karlhovsvägen 46, Norrköping.

## LINGVAJ DEMANDŌJ

### PRI LANDNOMOJ.

#### I.

Jam antaŭ jardekoj oni en Esperanto-gazetaro diskutis pri landnomoj. La formoj -ujo, -io, -lando havis siajn defendantojn. Por ĉiuj kontentigan solvon de la problemo oni ne trovis. Laŭ la gramatiko de Esperanto ĉiuj tri formoj estas uzeblaj, sed ne arbitre, ĉar -io estas uzebla nur tiam, kiam -i- troviĝas jam en la originala vorto (ekz. Romano), kaj -ujo estas aldonebla nur al la nomo de nacio (ekz. franco, Francujo). Oni memoru, ke io en Esperanto estas pronomo, ne al vorto aldonebla finaĵo.

Nun la malnova temo aktualigis pro tio, ke rektoro Vilkki proponis enkondukon de "Suomujo" anstataŭ Finnlando (aŭ Finlando). La propono estas nur privata kaj mi dubas, ĉu finnaj esperantistoj ĝin subtenus. Mi kontraŭe subtenas la opinion de Dro Szilágyi esprimitan en n:o 1 de SET. Ĉar la vortoparto suom ne estas nomo de nacio (finno = suomalainen), la finaĵo -ujo ne estas aldonebla al ĝi, kaj la nomo "Suomujo" ne estas internacia nek nacia. Ne eĉ finnaj ne-esperantistoj rekonus en ĝi la nomon de sia lando, por ne paroli pri eksterlandanoj.

La malfacilaĵo en la landnoma problemo laŭ mi konsistas plejparte el tio, ke oni volas esperantigi proprajn nomojn. Sed ĉu tio estas necesa? Se oni tute preterlasus la demandon pri la finaĵo, oni facile povus interkonsenti pri la uzotaj radikoj.

Ĝis kiam la Akademio estos solvinta la problemon kontentige, oni devas uzi la ĝisnunajn — bedaŭrinde tro multspecajn — formojn, sed se iu nepre volas uzi la naciajn nomojn, pli volonte uzu ilin en originala formo:

Sverige, Danmark, Eesti, Suomi, ĉar tiuj formoj tamen estas (skribe) pli konataj ol la kunmetaĵoj el nacia nomo kaj Esperanta finaĵo.

Hannes Koivu, Eksdel. de IEL. Viipuri (Viborg).

#### II.

Antaŭ dek jaroj oni skribis nomojn de landoj kun finaĵo -io. Almenaŭ subskribinto komprenis la finaĵon kiel "zamenhofa" kaj pro tio estis malfacile ŝanĝi ĝin al -ujo. Kiam ni bezonas uzi nomon de iu lando, ni ne konsideras, kiu nacio kulturis aŭ loĝas koncernan landon. Kiu lando estas loĝata pure de unu nura gento? Kial ni ne do povas skribi la nomojn kun landnomoj? Tiam oni belsonus: Anglio, Germanio k.t.p. Multaj malnovaj landoj jam havas nomon finiĝanta per -io. "Novaj" landoj ekz. Finnlando — nacia nomo Suomi — estus oportune Suomio, suomio, suoma, Iranio, irano, irana k.t.p. — Ankoraŭ nun oni uzas mikse finaĵojn -io kaj -ujo. Oni stabiligu ilin, antaŭ ol ili kristaliĝas iel nekontentige.

Rilate al nomo Finnlando la propono de s-roj Petersen kaj Vilkki — nome Suomujo — estus pli bona ol kontraŭesperanta Finnlando — se ne oni povas denove fini landnomojn per ilia propra finaĵo -io.

A n t t i R a s k u, Kihnio, as.

## Solvo de la konkurso

pri la preseroj en la artikolo: Vortfiguroj en la febr. n:ro, paĝo 12.

Staras:

1. ciaz
2. kuko (3-foje)
- 3, 4. metafosoj
5. Ia
- 6, 7. paĝo tiuj
8. detoj
9. frostintan
10. malantaŭ de ...
- 11, 14. fiĝo
12. ĝermane
13. membroj. z
15. pseudonimo

Devas esti:

- naciaj (aliaj aprobata)  
kuko (4-foje)  
metaforoj  
La (tiu apr)  
paŝo al (ĝis) tiuj  
dentoj  
frostintaj  
malantaŭ ...  
fiŝo  
germane  
membroj.  
pseudonimo

Rimarkoj:

- 1) Amaso de metaforoj, aŭ amaso da metaforoj? La nuanco estas subtila, ambaŭ solvoj estas akcepteblaj. Pri tio ni respondos aparte en iu venonta numero.
- 2) Bohemo. La vorto estas uzebla en tiu ĉi formo laŭ la 15-a § de la Fundamento (pri la internacie uzataj vortoj).
- 3) La distingo inter germana kaj ĝermana lingvoj estas intenca. La dana, angla lingvoj ktp. estas ĝermanaj lingvoj.
- 4) Klara(j) metaforo(j). Ambaŭ bonaj. Pro la -e-finaĵo (multe) ne gravas ĉu sing. aŭ plur.
- 5) Kune kun: ne estas eraro, sed temas nur pri la fortigo de la efiko.

Gajnintoj: s-roj Hannes Koivu, Pellervonkatu 10.B.12, Viipuri, Suomi (13 trovitaj eraroj); Ilmari Ekström, L. Rantakatu 17, Turku, Finnlando (12); Karl Blomkvist, Stöckeby (12). Plej proksime venas s-roj Vilborg kaj Dahlén kun 10 trovitaj eraroj, inter ili unu el la du malfacile troveblaj (n:roj 2 kaj 7). Pro translokigo de la Eld. Soc. la premioj venos nur post iom da tempo.

## Literaturo.

ORKAŬ LA MONDO, den av de portugisiska esperantisterna utgivna småskriftserien, har utökats med ytterligare ett häfte, La araneoj, innehållande en artikel om spindlar av professor Agostinho de Silva. Om vi inte tycka så bra om den, som vi tyckte om hans skildring av bävrarna, La kastoroj, så beror det nog på vår större sympati för de intressanta skogsskövlarna och vår antipati mot de feta men intelligenta mångbeningarna. Som esperanto-litteratur är det lilla häftet både instruktivt och välkommet. Det kan köpas hos Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg, postgiro 44 38 1. Priset är ej utsatt men är sannolikt det vanliga — 50 öre. Tillskriv nämnda adress.

## Insamlingen till propagandakassan.

Varje klubb anslår 50 kr.  
Varje esperantist en dagsförtjänst!

Så lyder maningen till Sveriges esperantister för att skapa en fredsfond, tillräckligt stor att ge verkligt stöd åt esperanto.

Låt det bli 100 %-igt deltagande i denna Esperantoförbundets strävan att göra sig berett för fredstidens esperanto-propaganda. Var och en bör delta efter sin förmåga. Men underskatta inte Er förmåga!

Varje klubb, som har en energisk ordförande (och vilken ordförande är icke energisk!), bör göra i ordning en insamlingslista för att samla bidrag. Det är den energiske ordföranden som tillsammans med kassören bör sköta om, att varje medlem personligen får först ett erbjudande och sen en uppmaning att lämna bidrag. Insamlingen är helt beroende av vars och ens medverkan. Och ordföranden bör minnas, att om man överlåter åt varje medlem att själv sända in bidrag till insamlingen, så blir resultatet magert. Vi regeras alla av tröghetslagen och "kommer oss inte för", om inte någon förelägger oss en uppgift eller ber om hjälp. Det är därför som ordföranden bör stå som initiativtagare!

Hittills ha följande personer tecknat bidrag:

G. Wolmer, Tungelsta .....	bet. 25:—
E. Malmgren, Stockholm .....	" 25:—
T. Julin, Stockholm (tekn. 40:—) .....	" 10:—
E. Julin, Stockholm (tekn. 40:—) .....	" 10:—
Greta Enberg, Stockholm .....	" 10:—
Paul Nylén, Stockholm .....	" 10:—
K. Wästfelt, Stockholm .....	" 10:—
Einar Dahl, Uddevalla .....	" 20:—
S. Sundin, Karlskoga .....	" 5:—
O. Juhlin, Hamburgsund .....	" 5:—

Insamlingen kommer att pågå t.o.m. 1 oktober. Men sänd redan nu i vår Ert bidrag till Förbundets postgiro-konto 20 12.

## SEF Kolono

La membroj de Sveda Esperantofederacio per ĉitio estas vokataj al federacia kunveno sabate la 27 majo 1944 (Pentekosta Vespero) je la 19.00 horo en Stadsfullmäktiges Plenisal, Stadshuset, Karlskoga. La traktadoj daŭrigas la postan tagon je la 10.00 horo en la sama ejo.

\*

Rajtigiloj por la klubaj reprezentantoj devas 2 semajnojn kaj proponoj al la federacia kunveno 1 monaton antaŭ la kunveno esti sendataj al la federacio.

\*

La laboro pri fakterminaroj estas tre grava, ĉar esperanto devas esti senriproĉe taŭga sur ĉiu kampo. Sed ŝajnas al mi ke mondmilito ne estas konvena tempo por ellabori ilin, ĉar tio devas okazi kun la plej intima kontakto inter fakuloj el diversaj landoj aŭ lingvoj. Kaj ĝuste nun tia kontakto ja mankas.

\*

Motala Esperantoklubo decidis fondi ŝparkason por ebligi al la membroj fari vojaĝojn kaj tiamaniere progresi en esperanto. Imitinda faro.

\*

La lernantoj de Einar Dahl, Uddevalla, fondis propran esperantoklubon kun la nomo 'La Fajrero', kiu aliĝos al SEF. Ni gratulas al la bravaj junaj samideanoj.

\*

La novaj raportblankedoj verŝajne stimulis la klubojn al pli vigla raportado. Laŭ nova sistemo la klubaj raportoj al SEF ankaŭ aperos en Sveda Kroniko, se la kluboj ne aparte raportas al la gazeto.

\*

La Pola Helpe elsendis alvokon, ke ni svedoj al la suferanta pola popolo donacu uzitajn vestojn, sukeron kaj marmeladon. La varojn akceptas la pola konsulejo.

Erik Dahlbergsgatan 20, Malmö, aŭ la Pola Ruĝa Kruco, Regeringsgatan 22, Stockholm.

\*

Alva Myrdal en la sveda lingvo verkis libron pri "Postmilita planado", kiu certe povas interesi la esperantistojn. 106 paĝoj. 1.75 kr.

S a l e x.



La sindiko libertempas.

### OMBUDSMANNEN

reste den 27/2 norrut och började arbetet vid klubbmöte i Krylbo, där både lägre och högre examen var anordnad. Klubbmöte följde 28/2 även i Borlänge, där hr Fejde tillstötte och "la kamerala sindika laboro" upptogs. Den 1/3 höll hr Morariu 2 föredrag i Säter och den 2/3 fyra (4) föredrag i Avesta och fortsatte till Krylbo för fortsatt högre examen. Den 3/3 hölls 2 föredrag och en provlektion och den 4/3 2 i Falun, där pastor Furhammars oväntade död gjort ett djupt intryck, åt vilket bl. a. vår ombudsman gav ett vackert uttryck genom minnesord i Falu-Kuriren.

Resan gick sedan över Kungsgården till Gävle och nu kunna vi följa ombudsmannen genom de långa artiklarna i Hälsinglands och Medelpads tidningar, som känneteckna hans väg över Söderhamn—Ljusne—Bollnäs—Ljusdal—Hudiksvall—Sundsvall—Sollefteå och slutligen Östersund. Överallt har ombudsmannen spritt nyheten om förbundsstyrelsens djärva initiativ att rusta för en esperanto-världskongress i Sverige, så snart kriget slutar.

Resan söderut går över Ljusdal, Ludvika och Brunnsvik till Stockholm, där föredrag i Borgarskolan är utlyst till den 31/3.

Ur reserapporten kunna vi notera goda klubbmöten i Gävle och Sandarne samt föredrag i Söderhamn, Bollnäs, Hudiksvall och Forsa. I Sundsvall deltog hr Morariu i en särdeles lyckad klubbafon den 18/3 och den 19/3 ankom han till Härnösand. Här följde klubbmöte, föredrag och en provlektion i Mellersta Norrlands Ungdomsskola. Sådana kommo också till stånd i Östersund 21/3 och Mjellom 22/3. I Sollefteå voro esperantisterna i färd med att förbereda sitt deltagande i stundande "Hobby"-utställning.

**JÖNKÖPINGS läns distrikt de SEF** la 25-an de marto jarkunvenis en Nässjö. La prezidanto bonvensalutis kaj diris kelkajn funebrajn vortojn pri nia mortinta amiko pastro Furhammar, kiu ja estis filo de Smolando.

La pritraktadoj gvidis nia dana samideano Borggren, Verda stelo. La jar- kaj revizora raportoj estis aprobataj kaj la distrikta estraro ricevis sensarĝon. Reelektiĝis la plenuma komitato, kiu konsistas el la jenaj personoj: Knut Jensie prez., Martin Fejde kasisto kaj Walter Svennar sekretario.

La kunveno sendis telegramon al la Skania jarkunveno en Eslöv.

Fraŭlino Anna-Greta Fejde estis elektita kiel reprezentanto por la jarkunveno de SEF en Karlskoga.

Post la pritraktoj faris la dana samideano interesan paroladon pri la okupiĝo de Danujo.

Ĉeestis reprezentantoj el Jönköping, Nässjö, Vaggeryd, Eksjö, Skärstad, Huskvarna, Aneby, Smålands Anneberg kaj Göteborg.

**LA SKANIA DISTRIKTO DE SEF** jarkunvidis 25/3 en la Urba Hotelo, Eslöv. Multaj delegitoj de la diversaj skaniaj esperantokluboj ĉeestis. Laŭ la jarraporto



la pasintjara laboro estis bonega. Kursoj, diversaj paroladserioj kaj ĝuindaj ekskursoj estas menciindaj.

La estraro: Jan Strönne, Malmö, prez., Ossian Nilsson, Hälsingborg, vicprez., Lennart Magnusson, Malmö, sekr., Clary Hansson, Malmö, vicsekr., Eric Fredin, Malmö, kasisto, kaj krome Birger Johnsson, Kristianstad, Einar Lemke, Hälsingborg, kun Ture A. Edberg, Mölleberga, Frans Rasmusson, Malmö, W. E. Lindqvist, Eslöv, kaj Bernh. Melin, Eslöv, kiel anstataŭantoj.

La reviziistoj: Hilbert Hansson, Malmö, kaj Stina Persson, Malmö, kun John Fogelberg, Hälsingborg, kaj Maria Persson, Malmö, kiel anstataŭantoj.

La plenuma komitato de la estraro: Jan Strönne, Lennart Magnusson kaj Eric Fredin, Malmö.

Distrikta studgvidanto: Jan Strönne, Malmö.

Reprezentanto ĉe la SEF: a jarkunsido en Karlskoga: Ossian Nilsson, Hälsingborg, kun Jan Strönne, Malmö, kiel anstataŭanto.

Prepara komitato por la elektoj 1945: Ester Andrén, Malmö, John Fogelberg, Hälsingborg, kaj Hans Petersson, Lund.

La jarkunsido decidis aranĝi komunajn distriktajn ekskursojn al Ystad kaj Röstånga la venontajn someron kaj aŭtunon kaj krome akcepti inviton de la klubo en Hälsingborg partopreni ekskurson al Värsjö frusomere. Klubo Esperantista de Malmö sciigis, ke la distrikto de nun ricevas senkoston abonon de La Folio al la distrikta estraro kaj klubaj reprezentantoj. La venonta jarkunsido okazos en Malmö 1945, kiam la distrikto festos sian 10-jaran jubileon.

Anstataŭ telegramojn la jarkunsido sendis salutleterojn al kelkaj esperantistoj, kiuj kunlaboris kun la distrikto la pasintan jaron.

Post la jarkunsido sekvis amuza kunestado kun kaftrinkado, babilado, libroloterio ktp.

Partopreninto.

## SVEDA KRONIKO

**GRUMS Esperanta Klubo** havis jarkunvenon la 29an de febr. La tuta estraro reelektiĝis kaj estas laŭ jene: Ernst Karlsson prez., Georg Nordling vicprez., Ragnar Andersson kasisto, Gustav Andersson sekr., Robert Kruslock kaj Rune Magnusson reelektiĝis kiel revizoroj. Dum la kunveno la interlaboro inter la plej proksimaj kluboj estis speciale diskutata kaj la estraro ricevis komision esplori la eblecojn por tia interlaboro.

"EKO".

**GÄVLE** 31/1 1944. Esperantoföreningen jarkunvenis en Wiener-Condiss. Laŭ la jarraporto la unuigo en 1943 havis 18 kunsidojn. Dufoje dum la jaro esperantaj "apostoloj" vizitis la klubon. En la printempo la sindiko, Tiberio Morariu, en la slojda ejo Ö. Bergsgatan 5 parolis pri esperanta korespondado dum la milito. La vespero estis la plej gaja kaj plej bone vizitata dum la jaro. En la aŭtuno dro Szilágyi, tre ŝatata gasto, prelegis pri sonimitaj vortoj en Esperanto.

La agadaj kaj revizoraj raporto estis aprobatataj kaj la estraro ricevis malsarĝon pro sia agado. La estraro por la jaro 1944: Gösta Aström prez., Alb. Liljemark vicprez., Arne Lenner sekretario, Wega Hansson vicsekr., Gunnar Wesslén kasisto, Erland Holmqvist bibliotekisto, kaj Signhild Johansson klubmastrino. Anstataŭantoj: C. Müntzing, Victor A. Östlund kaj Ellen Holm. Revizoroj: Gunnar Bengtsson kaj Siri Nordling. Revizora anstataŭanto: Asta Aronsson. Redakcia komitato: Arne Lenner, O. Millgårdh kaj Victor A. Östlund. Reprezentanto por Eldona Societo Esperanto: Gösta Aström. Delegito de IEL: Gösta Aström. Post la elektoj estis agraba kunestado.

8/2. Nova vizito de la sindiko, kiu en sia eleganta maniero unue rakontis pri interesaj svisaj travivaĵoj kaj poste kondukis nin al svedaj cirkonstancoj parolante pri soldatdeĵoro kaj malsanuleja restado. Gösta Ahlstrand ricevis bone merititajn aplaŭdojn pro sia drama deklamo de Fröding kaj Karlfeldt. Post gaja kantado estis tempo iri hejmen.

G. A.

**KUMLA**. La Estonto jarkunvenis 27/1 1944. La estraro kaj revizora raporto estis aprobatataj kaj la estraro ricevis plenan malsarĝon. Estraro por 1944: Prez. f-ino Ingrid Larsson, sekr. Tage Goldheim, kasisto Astrid Hammarberg. El la estrara raporto ni povas mencii ke la klubo dum 1943 havis 11 protokolitajn kunvenojn kaj aranĝis unu distriktan kunvenon. Propagandon la klubo faris per siaj propraj afiŝtabuloj per speciale farita materialo. Plue la klubo kontribuis al programo dum kunveno aranĝita de ABF speciale por gejunuloj.

Fritz Ström.

**MOTALA**. Jarkunveno de Motala Esp.-klubo okazis la 5/3 1944. Preskaŭ la tuta estraro estis en militservo, tial ni devis prokrasti la jarkunvenon ĝis nun. Jara kaj revizora raporto estis aprobatataj. Kiel estraranoj elektigis: Axel Seger prez., Sten Gustafsson vicprez., Gösta Hedin sekr., Gösta Seger vicsekr., kaj Carl Hallros kas. Kiel studgvidanto estas Sven Uno elektita. Delegito de IEL estas Carl Hallros.

El la jarraporto ni povas noti, ke la klubo pasintjare partoprenis en junulara semajno kun prelego, kantado kaj muziko de klubaj membroj kaj ke la klubo aranĝis ekskurson al Linköping kaj vizitis klubon tie, kiu aranĝis festenon.

La studmovado en la klubo daŭrigas. Dum somero estis kurso koresponda, kiun gvidis Hallros, kaj en la aŭtuno ni sukcesis aranĝi studrondon por komencantoj en ABF.

La klubo ankaŭ decidis fondi ŝparkason por ebligi al la membroj fari vojaĝojn kaj tiamaniere progresi en Esperanto.

Axel Seger.

**TIERPS Esperantoförening**. Komence de okt. 1943 komenciĝis kurso en esperanto. Ĉiuj membroj de la klubo partoprenis. Kaŭze de militservo la plejmultaj partoprenantoj forlasis la kurson, kiu do devis finiĝi. Esperanta Studservon abonas ĉiu membro.

En **TUNA-HÄSTBERG** oni provis fari kursojn, kiujn oni tamen devis rompi. Sed oni intencas daŭrigi pli poste.

**UDDEVALLA**. La kluba vivo dum 1943 ne estis vigla, sed la fideluloj restis kaj kunvenis por ekzercado kaj interbabilado. En la popollernejo la samideano Dahl gvidis kurson por infanoj el la 5-a klaso. La rezultato tre bona. Pri la kurso raportis la lokaj kaj aliaj gazetoj. La kursfinon ĉeestis Morariu. Ĝi estis publika. La lerneja inspektoro, la gazetara reprezentanto kaj gepatroj de la lernantoj ĉeestis. La inspektoro laŭdis la iniciaton kaj deziris bonan daŭrigon. Li estas nia simpatianto. Morariu faris paroladojn en ĉiuj lernejoj de la urbo.

Dum ĉi tiu laborjaro la kursado en la popollernejo daŭrigas, kaj la intereso restas. La disĉiploj fondis propran esperantoklubon, "La fajrero". Ĝi aliĝos al SEF.

Ede.

**VETLANDA Esperantoklubb** jarkunvenis la 22 de marto. Jara kaj kasa raporto estis aprobitaj. La estraro: prez. Gunnar Karlsson, kasisto Arne Sjögren, cetraj: Erik Karlsson, Lennart Hultén kaj Thure Malm. Revizoroj: Reinhold Hansson kaj Gustav Karlsson. Delegito por IEL Gunnar Karlsson kaj por ABF Torsten Ekvall. La klubo kunvenas la duan jaŭdon ĉiumonate. La klubo havis la ĝojon resaluti en nia klubo sian fondulon s-ron Gunnar Karlsson, kiu nun retransloĝis al Vetlanda kaj reelektiĝis kiel prez. Post la kunveno estis aranĝita kunestado.

M-m.

**KRISTIANSTAD**. La Verda Stelo 43—44. Tri studrondoj aranĝitaj: 1) komencanta (ripetado de "Sistema kurso") kunvenas ĉiun duan semajnon; 2) konversacia (laŭtlegado, interpretado kaj interparolado), kunvenas trifoje monate; 3) literatura (laŭtlegado el Fabeloj de Andersen, La Espero k. a. unufoje monate), krome kunestado ĉe ĉiu kunveno de la klubo.

**LUND**. La esp.-klubo kunvenis 20.1. S-ro Landgren pledis por persona propagando kaj propagando per anoncetoj. Kiel reprezentanto al la jarkunveno de Skania Esp.-Distrikto estis elektita sro Karl Landgren. Demanda sporto gvidata de Fritz Bengtsson. Esp.-kurso gvidata de sro Edvin Falck. 8.3. jarkunveno multe vizitata. 6 novaj membroj. La estraro: Fritz Bengtsson,